



PENSEO

N-ro 395

Sept. / 2024

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Hejmvilaĝo en la sonĝo

Belimponas mia hejmvilaĝo
kun gracia pimpa silueto.
Jen mirinde sorĉas la pejzaĝo,
eĉ tutjare verdas la monteto.

La ĉiel' lazuras tra vastforo,
kaj tiea suno brilas hela.
La kamparo plenas de fervoro,
ĉio flagras laŭmemore bela.

Jam delonge de vi mi apartas,
ofte mi en sonĝo vin sopiras.
Kara mia, kiel vi nun fartas?
arde vin revidi mi deziras.

Iam oni vivos jen libere,
aspirante vigli pli prospere.

Rendevuo en la sonĝo

Via kis' kortuŝas dolĉtenera,
ni brakumas en ekstaza mutio.
La pasio vervas ja sincera,
kun la reciproka korsaluto.

Graca sento restas neforgesa
kiel la pompanta pimpa floro.
Mar' profunda ondas plenkaresa,
milde kun printempa zefirgloro.

Rendevuon en la sonĝo bela,
alte varti ni pasie devas.

Tiel linde vi ridetas hela,
estas vi, mi kiun ofte revas!

Estingiĝos ne l' beata flamo,
nek delice korinklina amo.

Haventemplo

Ĉe la bord' de l' Rejno, jen haveno,
sankta templ' nubtuŝas al ĉielo.
Urb' Romia estas ja Ksanteno*,
kun muzea parko kaj kastelo.

Dio gardas navigad-sekuron,
oferfajroj ĉiam ardas hele.
Feo benas komercad-kulturon,
preĝas la kredantoj jen fidele.

En la Templ' resonas vort' de Dio,
vizitantoj sentas praspiron.
Laŭ Romia glora tradicio,
mi pilgrimas tien sekve riron.

Templ' antikva tra pratempo staras,
bildo de Romio tiel klaras.

** Ksanteno (germane: Xanten) estas la antikva Romia urbo ĉe la bordo de la Rejno, Germanujo.*

Medito pri l' antikveco

Ĉe bord' de l' Rejno staras l' Urb'
Ksanteno*,
Kolonoj jen nubtuŝas pri l' Haveno**.
Neptuno gardas navigad-sekuron,
Merkuro spronas komercad-kulturon.

Oferfajro iam ardis hele,

Preĝis la pilgrim' fidele.
Mi meditas pri la antikveco,
Rom' antikva restas kun glordeco.

* *Ksanteno (germane: Xanten) estas la antikva Roma urbo ĉe la bordo de la Rejno (germane: der Rhein), Germanujo.*

** *Temas pri la tiea Havena Templo (germane: Hafentempel).*

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Princino Anna

(kantteksto, muziko de E. Puĥova)

El la ripozej' sendorma
en sopiro kaj ĉagren'
paliĝinta, trista, morna
venis halon reĝo Ken.
Li kun laco kaj senforto
alparolis de l' ŝtupar':
Bonan tagon, Nia Korto!
Bonan tagon! – eĥis ar' –
234 kortestroj,
30 ceremoniestroj,
111 kamerherroj,
340 kurieroj
kaj servistoj – 504.

En sopiro senesprima
plendis li kun febla plor':
- La person', al Ni proksima
Nin hontigis ĝis dolor'.
Jes, hodiaŭ Nia Dio
punas Nin pro ia pek'!
Kion diros vi pri tio?
Kaj sopire diris: - Eĥ!..
234 kortestroj,
30 ceremoniestroj,
111 kamerherroj,
340 kurieroj
kaj servistoj – 504.

Nia id', princino Anna,

senatende – jen konfuz' –
sen deziro Nia sana
kaŝe... naskis filon ĵus!
Do informu Nin sincere
tuj pri l' Korta opini':
Kiu kulpas enafere?
Kaj mallaute diris: - Ni...
234 kortestroj,
30 ceremoniestroj,
111 kamerherroj,
340 kurieroj
kaj servistoj – 504.

(65 geesperantistoj el 22 urboj de Rusio partoprenis en la tradiciaj Tiĥvinaj Esperanto-metiejoj kun varia kaj interesa programo.)

La postgusto de Tiĥvinaj Esperanto-metiejoj
en la brusto varman ondon levas tra l'vekitaj
vejnoj.
Malgraŭ laco – ja kutima – senstreĉiĝon mi
eksentas,
kombas mian grizan barbon kaj kontentas, jes,
kontentas,
ĉar por mi la finrezulto estas senkonteste
klara:
naskis mian kontentecon la kontento amikara.
Tiujn tagojn el la koro ne forviŝos do forgeso,
kaj mi dankas ĉiujn miajn geamikojn pro
l'sukceso.

En mia feria viv'
konstantas la lingva temo:
la movo kaj la agemo,
de l' arboj matena spir',
la ĝojo renkonti vin,
la kantoj de l' fajra nokto,
la rido kaj eĉ la dokto,
la voko de la foir'.

Multas lingvoj ĉirkaŭ mi:
Lingvo ama, lingvo kanta,
lingvo rada, lingvo fluga,
lingvo de la mateniĝ'.

Unuigas ĉion ĉi
sola lingvo – esperanto,
kaj ferian lingvon tian
mi parolas kun feliĉ’.

Sed mia labora nun’
inklinas al lingvo ronda,
ordona kaj senresponda
papage balbuta lud’.
Foriras kaj venas sun’
en griza nebulo neĝa,
kaj premas parol’ laŭleĝa
sen salo kaj sen salut’.

Unu lingvo ĉirkaŭ mi:
Lingvo stranga, lingvo randa,
lingv’ papaga, ĉiutaga,
pli amara ol absint’.
Kaj malindas tie ĉi
l’ vasta lingvo esperanto,
kiun foje – reve, ĝoje,-
ni parolis en pasint’.

Do, vagas eterne mi
en blindo aŭ en ebrio,
ĉar logas min la ferio,
sed tenas min la afer’.
Naivas infana mit’
pri land’ de l’ eterna festo,-
kunvivas en unu kesto
la ĝojo kaj la sufer’.

Balanciĝas antaŭ mi
lingvo loga, lingvo kanta,
lingvo kruda, lingvo truda,
kaj eternas la motiv’.
Mi rigardas tion ĉi
kun la koro esperanta,
kvazaŭ movon de l’ pendolo,
kiu estas mia viv’.

Mi ekvivus plezure en paco de l’mond’
lavenda,
en aromo densa, tiklanta ĉiun naztruon,

kaj ripozus en mola lulseĝo kun la manplen’
da
dolĉaj framboj maturaj, neglektante eksteran
bruon.

Sed la mond’ senpaca kruele mian vivon
penetras,
sed la bruo de l’ foraj militoj en miajn orelojn
venas.
Jen averto klara por mi: en la viv’ ĉiutaga
nepras
scii, ke en realo ne ĉie la mond’ lavendas.

Do eĉ se en ĝardeno lavendo fascine floras,
mi atentis informojn el la ĉiutaga kulmin’,
ja la bruo ekstera, kiu dume sekure foras,
certatempe povas senpere atingi min.

Alvenas ia-tia tag’ somere,
kaj mi konstatas, ke jam certe ne re-
naskiĝos flore la velkintaj floroj,
ke la humoroj iĝos rememoroj,
ke retravivo de l’ fascinaĵoj tagoj
ja estas, certe, pli sensenca blag’ ol
remaĉo mensa de iama ĝuo,
vaporiĝanta en la kontinuo.
Do, preparante min por viv’ aŭtuna,
mi spronas pensojn al la tempo nuna
kaj, mergiĝante en la novajn planojn,
kontente frotas la jukantajn manojn.

En la hela junaĝo, vivanta senmone, tamen
honeste,
kredis mi ke la mondon movas antaŭen la pura
justo.
Estis mia kredo naiva apogo por alta aprez’ de
la junaĝa epoko, semanta esperon en mia
brusto.

Poste foren rapidis pli ol duonjarcento
eventoriĉa,
Jaro jaron spronis, kaj juna aŭroro kadukan
aŭronon ŝanĝis,
Estus, certe, mensogo diri, ke lulis min ondo

feliĉa
ĉiutage, dumvive, sed bonkora destino mia
arangĝis

ke alternis la tempostrioj, kaj post dense nigraj
venadis helaj,
forpelantaj mavan angoron, reprovizantaj
esperon.

Miaj planoj kaj agoj, verŝajne, neniam estis
tute modelaj,
Sed se iu riskas aserti tion pri siaj – li diras
malveron.

Barba grizo kaj sulkoj surfrunte min klerigis
pli bone
ol la grego mentora, atakanta per kruda kriaĉ'
aŭ insida flustro,
kaj ververe kontentas mi nun, elektinta vivi
senmone
sed honeste, malgraŭ ke l'mond' obstine fajfas
pri l'justo.

Alfluis la tria ondo
de miaj ĝardenaj floroj,
por la finsomera mio
pokalo da lasta ĝu'.

En la multkolora mondo
spegulas la rememoroj
pri la okazinta ĉio,
sed viv' mia fluas plu.

En pompo de l'hortenzio,
en simpla de l'kalendulo
en noblo de la dalio
sentebblas jam la aŭtun'.

Flugemas pli l'fantazi' ol
gruaro en for' nebula,
kaj floroj ekscitas pli ol
la homaj eventoj nun.

La viv' ne aspektas triste,
la tagoj paradas feste,

la riĉa rikolt' bonguste
bobelos en juna vin'.

Jes, bonas ekzisti disde
fiagoj, sed alta prez' de
l'indiferenteco juste
turmentas ja ankaŭ min.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Rapidas varma aŭgusto
Monato lasta de somer',
Saluto lasta de radioj sunaj
De revoj rozaj pri feliĉo kaj esper'.
Aŭgusto ĝisrevidas arbojn, marojn,
Aperis ora bril' en verda foliar,
Jam pretas forveturi birda aro
Kun sama rapidec' forflugas viva jar'.
Ni petas aŭguston, ne rapidi,
Ĉagrenojn ĉiujn ni forlasu,
Kutime antaŭ voj' eble eksidi
Por pli bonega temp' plenigu glason!

Vera Butko (rusa nuntempa poetino)

Ne estis ŝi en Emirlandoj,
Ne vidis la Romon ŝi fakte
Kaj eble ekvidos neniam, ĉar
Kun kiu ŝi lasu la katon?

Ŝi songas dum la mateniĝo
La urbon Ĉita, ege karan,
Kaj tien veturi ne povos
Kun kiu ŝi lasu la katon?

Dolor' - kiel akra trikilo
En spinon "eksidas" kaj "batas",
Klinikon ne eblas viziti,
Kun kiu ŝi lasu la katon?

Ŝi jam iĝos naŭdekjaraĝa
Ĝis cent restos forta, bonstata
Sekret' de viv' longa -tre simpla

Ne povas forlasi ŝi katon!



Ángel Arquillos (Hispanio)



Flugu alten

Flugu alten,
la ĉielo malproksimas,
kaj la tempo malfruiĝas,
flugu alten, mia birdo,
ĉar mi ne havas flugilojn.
Eble vi renkontos Dion,
kvankam mirakloj ne veras,
Dio certe vin atendas.
Demandu al li pri la viv'
kaj, se eblas, pri la morto
kaj pri nevidebla anim'
Mi tre dubas, kaj konfuze,
la mistero min teruras,
kaj la suferantaj homoj,
nun loĝantaj en la mondo

Ulrich Matthias (Germanio)



Savo

La vivo estas nur ĉagreno
kaj sola savo la forgeso.
Per amo, vino kaj veneno
la savon serĉas ni sen ĉeso.

Ho, kara, se vi min brakumas
per viaj tuŝoj tre teneraj
tuj mia tago griza lumas

kaj dronas ĉiuj zorgoj teraj.

Jadranka Miric (Serbio)



Belas vivo

Maljuniĝis mi,
maljuniĝis vi.
Harmonie spiras ni.
Spite ni emas longe kunvivi.

Nia maljunec'
dependas de animsimplec',
de vivanta vigla amikec',
de longjara fidela kamaradec'.

En okuloj viaj stelbrilo,
sur lipoj pasia poemdeklamo.
En voĉo via bezonata amo.
Sub brako ligna apogilo.*

Vi mezaĝulo bonstata,
mi en koro fraŭlino amata,
de vivo lernigita
de vivo punita,

Animo nutriĝas de via bonkorec',
de homa bezonata noblec',
kun nepra homa solidarec',
kaj de varmaj kisoj viaj.

**ligna apogilo/lambastono*

Lamento

Ne estas kulpo mia,
kriaĉis rivero.
Vento forte batante
levigis altajn ondojn ĝis vespero!

Someraj pluvoj
bonvenas al la soifa ter'.
Ventego ĥaose faris damaĝon
dum tia ŝtorma veter'.

Akvo mankas

Tage suno brile kaj varme
siamaniere salutas vin.
Tamen sufoko timas nin,
konstatas mi okullarme.

Ploras seka ter'
transformiĝante en la polvo.
Ie fiŝoj ludbaraktas ĉe riverbordo.
Kiam venos pluva veter'?

Ardo (Ĉinio)



Frumatena Vojaĝo

La sonĝo disrompiĝis en tagiĝo,
min vekis la senhaltaj veksonoroj.
Mi estis konfuzita pro la dormo,
mi sentis fridan venton en aŭroro.
Mi startis la vojaĝon frumatene,
neniu estis en strat-koridoro.
al la urbego mi nur estas gasto,
ventego blovas en survojoj horoj.

Blazio Vaha (Hungario)



Vi kalkulata

Mi koleras vin, amiko,
ĉar ci estas idioto.
Mi aprecas vin, amiko,
ĉar ci estas tre aminda.
Mi ne povas vin distingi,
ĉar vi estas unu sola.

Provizora toleremo reciproka

Jen mi estas komencanto
kun malbona komenckanto.
Tamen ci toleru min,
ankaŭ mi toleros cin!
Jen ni estas komencantoj
kun falsetaj komenckantoj!
Tamen ni tre petas vin

kun favor' akcepti nin!

Erika Godó (Hungario)



La perfekta poemo

La perfekta poemo estas kiel stelolumo,
alportas lumon kaj brilas en malluma nokto.
Danco de vortoj, versoj, ritmoj, melodioj,
kiuj penetras ĝis la profundo de mia koro kiel
revoj.

Mia imago teksitis de laĉita per sentoj verko,
ĉiu linio malfermis novan mondon al la
leganto.

Bildoj kaj sonoj kiel buntaj sonĝoj kaj
sekretoj,
la magio de vortoj estas en senfinaj pensoj.

Kio ni neniam forgesos esti perfektaj poemoj,
vi revivigas ĝin ĉiufoje, kiam vi legas ĝin iam
ajn.

Vi vidas la spegulon de via animo, kiam vi
legas ĝin,
ĉar viaj sekretoj kaj revoj malkaŝas en la
linioj.

Do skribu poemon, vian koron, ne timu
malfermi,
la linioj de la poemoj diras, kion vi sentas kaj
pensas.

Perfekta poemo estas unika kaj neripetebla,
ĉar en poezio ĉio estas libera kaj bela.

La maro

Ludas la mola ondo de la maro,
ĝiaj sonoj konserviĝas en helikaj konkoj.
La bluo de la maro estas senfina,
ĝi kunfandiĝas kun la blua ĉielo.
La vento alportas salan odoron de la akvo,
mi povas flari ĝian bongustan freŝan odoron.

Ĝia milda voĉo trankviligas min,
mi aŭdas la sonon de mevoj super ŝaŭmo.
La profundo de la maro kaŝas trezoron,
ĝian sekreton konservas la blankaj rokoj.

Mi rigardas ĝin mirinde, kie finiĝas la maro,
mi estas soleca kiel konkro sur la marfundo.

Se mi estus luno

Se mi estus luno sur la ĉielo,
tiel hela en la koro de la nokto.
Mi kovrus ĉion per mia arĝenta lumo,
mi sonĝus la sonĝon de la mondo.
Mi ludus kun la brilantaj steloj,
mi donus al la nokto brilantan vizaĝon.
Mia vizaĝo reflektus sekretojn, rakontojn,
ĉirkaŭprenante la ondojn de la maro.

Mi vidus la dezirojn, kiuj vivas en la koro,
mi rigardus naskiĝojn de amoj en silento.
Mi admirus du animojn dancantaj en la ĉielo,
kiam la lumo de tagiĝo leviĝas.
Mi kaŝus min kiel malnova memoro
sed ĉiu nokte mi denove revenus.
Mi estus kun vi en viaj sonĝoj,
kaj via nokto estus eterna miraklo.

Stanislao M Esposito (Italio)



Flustroj de la Eterna Printempo

En la trankvilaj ĉambroj de la koro, semo
moviĝas,
Sopiro esti vi mem, harmonie spiri,
Kun la pulso de ĉio, kio ĉirkaŭas,
Trinku de la Fonto, kie la radikoj renkontas la
ĉielon.

La mondo turniĝas en sia mantelo de surprizo,
Danco de la neatendita, kie mirakloj okazas,
Kiel tagiĝo trarompanta la vualon de nokto,
Rivelante verojn kaŝitajn en la matena roso.

Kio estas ĉi tiu vivo sed vojaĝo al la interna
fonto,

Kie la animo genuiĝas por trinki la akvon de
la Ĉielo,
Kaj en tiu hirundo, ĉiuj cikatroj estas
forlavitaj,
La vundoj de la tempo kisitaj de la balzamo de
la eterneco.

Mi petas Tiun, kiu ĉiam estas la sama,
Kion mi postlasas kiam mi paŝas en la
nekonatan?
Kiaj spuroj markos la sablojn de la tempo,
Kiam mi estas nur flustro en la vento?

Vivi estas elekti, decidi, krei,
Vojo de bonfarto kie korpo kaj menso
interplektiĝas,
Kie la spirito kreskas, ne en foresto de doloro,
Sed en la forto naskita de cikatroj brakumitaj.

En ĉi tiu ĝardeno de vivo, mi serĉas ligojn,
Kun la homo, la kreita, la dia, la amata,
Ĉar en ĉiu la akvo fluas el la ĉielo,
Kaj en ĉiu, mi trovas la veron, kiu kantas ene.

Ho, esti si mem estas trovi la harmonion,
Kie la notoj de mia estaĵo miksiĝas kun la Ĉio,
Kaj kiaj ajn ŝtormoj povas furiozi ĉirkaŭe,
Restas la interna printempo, kvieto, paco,
kanto.

Dum mi vojaĝas antaŭen, en la nekonatan
lumon,
Ĉu mi portu la aromon de ĉi tiu interna
printempo,
Postlasante spuron de amo, de vero, de estaĵo,
Heredaĵo de la Unu, la sama, en la eterna
danco.

Sabin Maruhe (DR Kongo)



Orfo

Antaŭe, mi travivis feliĉan vivon
sed nuntempe pro la militoj

Regas malsato
De lundo ĝis sabato
Mi vivas helppete,
Mi estas nun kiel besto
Mi ĉiam ne ĝojas ĉar mi ne havas loĝejon,
Mi ne frekventas lernejon
Malĝojigas min ĉiam kiam aliaj infanoj iras
lernejen.

Mia vivo estas en malordo,
Nevole mi ŝteladas nutraĵojn por pluvivi.
Sed ni kompatindaj orfoj esperas je brila
estintenco!

Paco

Kiam vi malaperigigas al milito, malsato
aperas.
Ni ploras ĉiam, nia vivo malboniĝas.
Mankas laboro, kion fari?
Homoj en tiu ĉi lando mortas!
Ĉie fluas senkulpa sango!
PACO, kie vi estas?
PACO, kiam vi aperos en ĉi tiu lando?
Ni, kiuj loĝas ĉi tie en la oriento de Kongo,
multe suferas.
Niaj koroj estas plenaj je vundoj!
Kion ni faru ?
Ni deziras PACON!
Ni ege sopiras al PACO!
Eĉ , se mallumo kovras ĉie, ĉiam en tiu ĉi
lando.
Ni esperas , ke la paco regos iam en la mondo.

Yoseph Nai Helly*

KIU ESTAS MI?

Kiu estas mi?
Eble vi scias.
Aŭ vi scias,
sed ne multe.

Rigardu min
per via mensa okulo.

Imagu pli longe,
pli malproksime.

Fakte,
vi ne scias multe.
Eĉ se vi scias,
nur preterpase.

Eĉ mi mem ne scias,
des malpli vi, kiu nur preterpasis
transirante la savanon
belan, plenan je trompoj.

Vi ne bezonas scii
ĉar ankaŭ mi ne volas, ke vi sciu;
ĉar mi mem ne konas
la profundon de la oceano.

Tio sufiĉas!
Nur lasu la venton blovi.
Nur aŭskultu la kantadon
de la kanario, kiu dancas
por inciteti sian partneron.

Ungaran, la 12an de aŭgusto 2024

* *Yoseph Nai Helly (okcident-timorano loĝanta en Yogyakarta) estas indonezia poeto, verkisto kaj bibliotekisto. Nuntempe li estas la estro de la biblioteko de la "Sekolah Tinggi Pertanahan Nasional (STPN) Yogyakarta" (indonezialingve, Nacia Tera Kolegio de Yogyakarta). Li ankaŭ estas membro de la redakcio de la "Majalah Pendidikan Literasi Guru" (indonezialingve, Revuo pri Instruista Legoscio-Eduko). En decembro 2023, lia indonezialingva libro "Kuubah Duniaku, Antara Imajinasi dan Kenyataan" (Mi ŝanĝas mian mondon, inter imago kaj realo) estis eldonita de Lembaga Ladang Kata en Yogyakarta.*

Esperantigis



**Yohanes Manhitu
(Indonezio)**

Carlos Matari

Pluvas

(kantteksto)

Pluvas,
La trotuaroj malsekaj estas.
Neniu spuro sur ili restas.
La pluvo nian sekreton tenas.

Pluvas
ĉe la fenestro mi vin sopiras.
la tagoj fremdas kaj min korŝiras.
malvarma tempo brakumas min.

La pluvo falas sur la tegmentojn
kie sidis ni intime,
Kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras,
sur min la pluvo serene ploras
ĉar vi estas for.
Sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas,
se mi ne plu aŭdas vin

Pluvas
kaj ĉiuj vortoj fariĝas nulo,
dum en la noktoj min hantas dubo
pri la destino de tiuj kisoj.

Pluvas,
dilentio ŝvebas en la kvartalo,
la suno strebas tra nuboj-baro
por plensekigo de trotuaro,
por plensekigo de la tegmentoj
kie sidis ni intime,
kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras,
sur min la pluvo serene ploras
Ĉar vi estas for

sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas,
se mi ne plu aŭdas vin

Sur la tegmentoj kie sidis ni intime,
kaj endormiĝis sen duboj, sentime,
sine de aŭror'.

Ĉi-hore la trinkejoj ne deĵoras
Sur min la pluvo serene ploras
ĉar vi estas for.
Sen vi mi sentas ke mi senkuraĝas
kaj la vundoj min damaĝas
se mi ne plu aŭdas vin

Se mi ne plu aŭdas vin.

Esperantigis



Liven Dek (Hispanio)

Vinícius de Moraes

Poeto kaj rozo

(Kun birdeta pluso)
Promene, ĉe blanka rozo
poet' incide deklaras:
Kiel bela! Ĝin prikantos
mi kiel neniu faras!
Samtempe grande surprizas
lin ke pro ŝajnmiskompreno
poiome l' blanka rozo
ruĝiĝegas de sinĝeno.
Certaj rozoj blankaveste
(Kaj ili tion profitas!)
opinias tre honeste
laŭ l' suk' al ili incitas . . .
Kio!? balbute l' poeto .
La roz': Abomenindulo !
Ĉesigu l' rigardon supren,
pieden ĉiu okulo!!!
Apud li ĉifoninfano,
malpura, en osta pozo ,

maçante bulon da tero ,
 sama ter' de l' vigla rozo . . .
 Tiaj milion-abundas ,
 kriçe l' rozo, mortmalsatas,
 dum vi plenmalkaŝe vante
 miaombre nur min flatas!!!
 Sub tuta rabiokrizo
 la petalojn tuj ĝi prenas
 for kaj ĵetas manĝocele
 dise al kiuj pansenas . . .
 La poeto sian kapon
 klinas, kune l' rozo spiras.
 Ĝemas vento. La roz' mortas .
 Kaj birdeto sin retiras
 De l' arbo de kie l' scenon
 tutan spektis en kvieto,
 ne sen lasi etan fekon
 sur la kapo de l' poeto .

Tradukis



Wellington Rocha

(Brazilo)

Frantishek Halas (1901-1949)



La tuta el aŭtuno

Ŝia robo estis el aŭtuno
 Kaj el aŭtuno estis ŝia hararo
 El aŭtuno estis ŝiaj okuloj.

Ŝia buŝo estis el aŭtuno
 Kaj el aŭtuno estis ŝiaj mamoj
 El aŭtuno estis ŝiaj revoj.

Ŝia vivo estis el aŭtuno
 Kaj el aŭtuno estis ŝia intergenuo
 El aŭtuno estis ŝia rideto.

Ŝia gusto estis el aŭtuno

Kaj el aŭtuno estis ŝia kompato
 El aŭtuno estis la anksio kaj la ĉagrenoj.

Ŝi estis farita el aŭtuno
 Kiel poemo por la Tago de Ĉiuj Sanktuloj.

Tradukis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El la ĉina antikva poezio

Li Yu (937-978)

—*laŭ melodio Budhista dancisto*

Floroj vualiĝas en nebul' maldensa
 en palblanka lunlum-bano.
 Ĝuste tempas vin renkonti en ĉi horo.
 Kun oritaj ŝuoj en la mano
 mi l' ŝtuparon tretas per ŝtrumpitaj
 piedoj.

Fine mi lin vidas en la suda halo
 kaj tuj treme nestas jen en lia sino.
 Malfacilas por mi vidi vin tre
 ve, pro mia mizerplena fi-destino.
 “Bone min domaĝu, mia kara!”

—*laŭ melodio Kanto de lavantino*

Profunda kort' kvietas,
 la halo jen senhomas plene.
 Jen kaj jen frapoj lavbatila
 alŝvebas en aŭtuna vento nun alvene.
 Maldormas mi dum longa nokto,
 frapsonoj orempikas al mi treme.
 Lunlum' penetras tra fenestro
 kaj kirlas miajn pensojn ĝene.

—*laŭ melodio Longa sopiro*

Kun harpingl' el jado
 enŝovita jen en hartubero
 ŝi sin vestas en tul-robo
 minca kun silkeca leĝero.

Iomete ŝi kuntiras brovojn
jen ĉagrene, pro ielo?

Vent' aŭtuna blovas,
pluvo flirtas en aero.
Ekster la fenestr' du aŭ tri
bananujoj staras en malhelo.
Dum longlonga nokto,
kion faru ŝi en pens-pelmelo?

—laŭ melodio *Fiŝista kanto*

Ondoj pelas ondojn
kiel neĝa flirto sur rivero.
Persikarboj mutas sur du bordoj
strebas al disflora belo.
Kun vinkruĉ' en mano
mi hokfiŝas kun libero.
Kiom da personoj pli feliĉas
ol mi, ho, sub la ĉielo?

—laŭ melodio *Belulino Yu*

Kiam la printempaj floroj kaj l' aŭtunaj lunoj
povus esti pasigita ĝis la fino?
Kiom da paseoj restas en memoro?
Lastanokte l' orienta vento laŭ rutino
ja denove blovas en etaĝon mian.
la perditan regnon ne toleras
vidi sub la brila lum' de lun-fascino.

La ĉizita balustrado kaj marmoraj ŝtupoj
devus resti en antaŭa stato,
tamen jam ŝanĝiĝis ŝiaj rozaj vangoj.
Se vi ĉuas al mi, por konstato,
kiom da ĉagreno ĝenas min turmente,
jen vi vidu la ŝvelintan riverakvon en
printempo
kiu turbulante fluas orienten sen kompatio.

Elĉinigiŝis



Vejdo (Ĉinio)

Geng Wei (ĉ.763)

Aŭtuna Tago

Reflektaj sunbriloj falas en vilaĝan vojon,
Al kiu mi povas diri miajn korturmentojn.
nuntempe neniu iras sur antikva vojo,
grenkampoj ekbalanciĝas en aŭtuna vento.

Zhu Tingyu (Yuan-dinastio)

Aŭtuno

Laŭ la Melodio de Tian Jingsha (Ĉielklara Sablo)

En korto falis for folioj de platanaceroj,
ĉeborde la lotusoj estas nun en malprospero.
Verŝajne ili konas mian koron kun sincero,
ruĝaj folioj forlasis la branĉojn kiel neĝeroj,
kaj flugas al mi por titoli miajn poemerojn.

Elĉinigiŝis **Ardo (Ĉinio)**

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Rememoro

— laŭ ĉinesko aromplena korto*

Rememoras
mi l' gloriarojn,
l' aromo forsvenas.
Pasinta ĝoj'
ne plu revenas.
Mi retrorigardas
moroza,
kor-serenas.
Profunde
nostalgia
mi vigli penas.

Venas
bontempo.
Salik' flirtas,

